

Hermann Claudius,

## Dumnokte

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Dumnokte falis prujno  
kaj faris ĝi  
preĝantoj arbustojn kaj arbojn,  
jen ĉiujn ĉi.

En blankaj plumovestoj  
preĝante sen  
moviĝo kvazaŭ staras  
nun ili jen.

Ne scias la arbaro<sup>2</sup>  
pri tio ĉi,  
ĝi tiel ja beligis,  
ĉu per magi'?

Ravite mi rigardas  
Nun tion ĉi,  
impresas, kvazaŭ estas  
ĉiela ĝi.

Trankvile ĉe la vojo  
mi haltas sen  
moviĝo, revas kiel  
la arboj jen.

...

---

<sup>2</sup>aŭ: Ne scias la naturo

*Traduko de la Germana poemo "Über Nacht" de HERMANN CLAUDIUS (Hermano Klaudio, \*1878-10-19 – †1980-09-08) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2006-03 .*

*MR-250-1 / Arg-407-804 (2007-04-24 11:38:37)*